# Finfine komencighis la lerneja jaro 2013-2014 en Togolando kaj aparte en Instituto Zamenhof

Komence de la lerneja jaro 2012-2013 la registaro fiksis datojn de diversaj ekzamenoj kaj ferioj. El tiuj datoj oni povas trovi tiun de la eko de la lerneja jaro 2013-2014 : 23a de septembro 2013. Char la lerneja jaro 2012-2013 plenis je manifestacioj politikaj kaj sindikataj, ne chio en la jaro okazis kiel planite. La registaro devis ghisdatigi sian planon kaj tiel fiksis je la 7a de oktobro 2013 la daton de la eko de la lernjaro 2013-2014. La ferioj komencighis la 26an de julio 2013. De tiam ghis la fino de septembro, politikistoj kaj sindikatistoj ne tute silentis. Kvankam nenio tiam malhelpis la glatan iradon de la chiutaga vivo, oni tamen audis pri depostuloj de sindikatoj de instruistoj : bonaj laborkondichoj, altigo de la salajro, pago de kromsalajroj, ktp. La registaro nenion deklaris, kaj jen ghi subite prokrastigis la ekon de la nova lernjaro ghis la 14a de oktobro. Pliajn tagojn poste okazis dua prokrasto ghis la 16a de oktobro. Sindikatoj de instruistoj deklaris
, ke
la lernjaro ne komencighos, se la registaro ne estos kontentigintaj ilin. Spite chion, la dato de la eko de la nova jaro 2013-14 restis la 16-a de oktobro 2013, kiam novaj gelernantoj aldonighis al la malnovaj por plenigi la klaschambrojn de Instituto Zamenhof (IZo).

Pliafoje montrighis, ke IZo tute ne kontentigas gepatrojn, char ties gefiloj ne trovis lokon en IZo por lerni. IZo tiel kulpas pri la bona organizado de la laboroj, kio altiras multajn homojn al ghi. La lernejo kaj la domoj de la gvidantoj estis vizitataj de gepatroj ke ties gefiloj povu studi en IZo. Tio ekokazis jam che la fino de la tria trimestro de 2012-2013 kaj dauras ghis nun. IZo starigis sian programon por akcepti novajn gelernantojn kaj agis lau ghi. Post la feriaj kursoj de la 19a de augusto ghis la 20a de septembro 2013, sekvis la semajno de la enskribo de novaj gelernantoj.IZo estis jam tiel preta por komenci la novan jaron la 7an de oktobro 2013, kiam okazis la prokrasto. Nenio povis malhelpi IZon komenci la novan jaron la 16an de oktobro 2013. Chio komencighis bone, ekde la infanklaso ghis la kurso de la plenkreskuloj.

La instruado al plenkreskuloj havas apartan lokon en la programo de IZO. La bona volo de la plenkreskuloj lerni ege kuraghigas ankau la gvidantojn kaj instruistojn de IZo. Jam che la fino de la lernjaro 2012-2013 la instruistoj kaj gelernantoj plenkreskaj interkonsentis, ke ilia nova lernjaro komencighu la 1-an de septembro 2013. Chiuj respektis la daton, kaj tiel ili estis en IZo tiun 1-an vesperon de septembro por la eklernado en la nova lernjaro. En tiu chi jaro malfermighas la kvara klaso de la elementa nivelo. La gepatroj estis en IZo pli ol unu monaton antau ol iliaj gefiloj. Ankau tiuj chi nun bone lernas ekde la 16a de oktobro dum la lernejojn publikajn skuas striko de la sindikatoj de instruistoj. Io alia trankviligas ne nur la lernejojn publikajn, sed la tutan popolon togolandan, kio vere ghenas la bonan iradon de la instrulaboroj en lernejoj : hholero furoras en la chefurbo Lome kaj ties chirkauaj urboj.

Kiuj iam vizitis IZOn matene, kaj nun revenas al ghi en sama momento, tiuj rimarkos gravan diferencon. La vendistinoj de nutrajhoj ne plu estas en la lernejoj, kaj IZo estas ne escepto. Por strebi al bremso de la disvastigho de la hholero, la registaro provizore malpermesis la vendadon de nutrajhoj al gelernantoj en la lernejoj en la lokoj kie estas la hholero. La tuta chefurbo Lome estas koncernata. Nun la gepatroj devas frumatene pretigi mem nutrajhojn al siaj gefiloj-lernantoj. Vere, tio tute ne estas facila al la gepatroj, kiuj kutimas doni iom da mono al siaj gefiloj, ke ili achetu manghajhojn en la lernejoj. Gepatroj impetas al IZo por demandi chu io ne povas esti farita por helpi, ke la gelernantoj de IZo manghu en la lernejo. La gvidantoj de IZo pripensas la aferon, kaj baldau kunvenos kun la gepatroj de la gelernantoj por vidi kio fareblas. Necesas protekti la vivon de la gelernantoj. Chiuj konsciu pri tio, ke IZo devas bone prizorgi siajn 618 gelernantojn (325 en la elementa nivelo, 220 en la dua nivelo (CEG) kaj 73 en la vespera kurso).

La 16an de oktobro 2013 malfermighis la pordoj de IZo por la nova lernjaro 2013-2014. La kurso okazas glate. La strikoj tute ne atingis IZon kaj la provizora malapero de la nutrajhvendistinoj ne chiujn gelernantojn ghenas. Certe la laboroj pluiras la jam starigitan planon, ke la rezultoj jarfinaj estu bonaj kiel en antauaj jaroj.